**ESPÉRANTO-NORD**
Fédération d'espéranto. Nord-Pas-de-Calais & Picardie

# Dua Interfederacia Konferenco

| | |
|---|---|
| Dato : **07 MAJ 2006** | Horaro : 14ª20 ĝis 16ª10 (1 h 50 min) |
| Loko : Rennes (35) — Kongresejo de la landa kongreso de UFE | |

Tagordo :

0. Enkonduko
1. Interfederacia mapo, kovro de Francio far la federacioj
2. Membriĝoj (kontraktoj) de la federacioj al UFE
3. Individuaj membriĝoj al la federacioj kaj UFE
4. Ĉiujaraj (ĉiujuniaj) ekzamensesioj far la federacioj
5. Interŝanĝoj de la federaciaj revuoj inter la federacioj

Partoprenis :

- *el la Aŭvernja Federacio :*
  - Eugène Papciak, prezidanto ........ EP
  - Josiane Papciak, vicsekretario ........ JP
- *el la Bretona Federacio :*
  - Claude Bensimon, prezidanto ........ CB
  - Josette Ducloyer, vicprezidanto ........ JD
- *el la Burgonja-Franĉkontea Federacio :*
  - Michèle Guingouin ........ MG
- *el la Centrokcidenta Federacio :*
  - Jeanik Marolleau, prezidanto ........ JM
- *el la Nordfrancia Federacio :*
  - Xavier Dewidehem, prezidanto, reprezentanto ĉe la komitato de UFE ........ XD
  - Claude Longue-Épée, vicreprezentanto ĉe la komitato de UFE ........ CLE
- *el la Orientfrancia Federacio :*
  - André Grossmann, kasisto ........ AG
  - Violette Walter, vicreprezentanto ĉe la komitato de UFE ........ VW
- *el la Provenca Federacio :*
  - Monique Arnaud, reprezentanto ĉe la komitato de UFE ........ MA
- *el la Rodanalpa Federacio :*
  - Alain Fagot, kasisto ........ AF
- *el la Sudopirinea Federacio :*
  - Jeanne-Marie Cash, prezidanto ........ JMC
- *el la Unuiĝo Franca por Esperanto :*
  - Xavier Godivier, vicprezidanto pri lokaj agadoj ........ XG

Sume, partoprenis 13 federaciaj responsuloj el 9 federacioj (el 15) kaj unu responsulo de UFE.
Prezidis kaj protokolis Xavier Dewidehem.

## 0. Enkonduko

Notoj : 1. La kunvenon prezidas XD. En 2005 li jam invitis la federaciestrojn por neformale kunveni cele al plikonatiĝo okaze de « interfederacia konferenco » en la internacia renkontiĝo *Boulogne 2005*. Tiu ĉi kunveno do estas la dua interfederacia konferenco, kiu celas pluan diskuton kaj interkonsenton de la federaciestroj pri pluraj aferoj propraj al la federacioj. La interfederacia konferenco celas pliintimiĝon, interŝanĝojn kaj homogeniĝon de la diversaj regionaj federacioj.
2. XG rimarkigas la ĝisnunan malhomogenon inter la federacioj kaj la bonon de tiaj interfederaciaj klopodoj.

## 1. Interfederacia mapo, kovro de Francio far la federacioj

Notoj : 1. Ne ĉiuj teritorioj de Francio (metropolo) estas kovritaj de federacio ; tio estas la kazo de la regiono *Champagne-Ardennes*. Estas ofte malfacile tie trovi Esperanto-movadon aŭ eĉ esperantistojn…
2. Laŭ la novaj statuto kaj interna regularo de UFE alprenitaj en 2000, la federacioj kongruigu siajn limojn kun tiuj de la francaj administraciaj regionoj. Tiu regulo ŝajnas esti bone observata kaj aplikata.
3. Ekzistas en pluraj federacioj « dezertoj », nome enfederaciaj teritorioj, sur kiuj lamas aŭ preskaŭ ne estas loka Esperanto-movado.

La Interfederacia Konferenco interkonsentas, ke :

> La senfederaciajn teritoriojn helpu la ĉirkaŭaj federacioj, tiel ke povu estiĝi aŭ revigliĝi federacia movado sur tiuj teritorioj.

## 2. Membriĝoj (kontraktoj) de la federacioj al UFE

Notoj : 1. Plimulto da federacioj jam kontrakte membriĝis al UFE. …
2. Kontrakto inter federacio kaj UFE *neniel kaj neniom* signifas, ke la federacioj perdos sian memstarecon, devos pagi ion al UFE, aŭ ne plu povos kunlabori kun aŭ membri en aliaj organizaĵoj, i.a. SAT-Amikaro. La federacioj restas memstaraj, ricevas monon de UFE, kaj krome povas diskuti kaj decidi en la komitato de UFE.
3. Konstatiĝas, ke en la nekontraktintaj federacioj oni ofte maltro aŭ mise komprenas la kontrakton kaj ties konsekvencojn, i.a. pri la plua memstaro de la federacioj, pri la nenioma pago de federacio al UFE… Sekve evidentiĝas, ke plua klarigo fariĝu al la nekontraktintaj federacioj.

La Interfederacia Konferenco interkonsentas, ke :

> Okazu nova kampanjo far la kontraktintaj federacioj kaj UFE por plu klarigi la kunlabor-kontraktojn « federacioj-UFE » al la nekontraktintaj federacioj, tiel ke ĉi tiuj povu kaj bonvolu estontece kontrakti kun UFE kaj sekve plene partopreni en la tutlanda movado.

## 3. Individuaj membriĝoj al la federacioj kaj UFE

Notoj : 1. Konstatiĝas, ke la membriĝaj sistemoj estas tre malsamaj inter la federacioj. En iuj, oni kotizu nur al UFE kaj aŭtomate fariĝas membro de la koncerna federacio ; en aliaj, oni kotizu kaj al UFE kaj al la federacio por esti membro de ambaŭ asocioj ; kaj ekzistas ankaŭ aliaj miksitaj sistemoj… tiel ke fakte regas malordo sur tiu kampo.
2. JMC proponis ampleksan reformon pri la tutlanda kotizosistemo, kiu koncernas kaj UFE'n kaj la federaciojn kaj la klubojn. Tiun proponon oni ekzamenos en tuj sekvonta laborkunsido okaze de la landa kongreso en Rennes.

La Interfederacia Konferenco interkonsentas, ke :

> Necesas, ke okazu profunda pripensado far la federacioj kaj UFE pri la kotizosistemoj tra la lando cele al plihomogenigo. Tiu pripensado povos baziĝi sur la propono de JMC pri tutlanda kotizosistemo.

## 4. Ĉiujaraj (ĉiujuniaj) ekzamensesioj far la federacioj

Notoj : 1. La Nordfrancia Federacio jam de 2003 organizas regionajn, trigradajn ekzamensesiojn en Junio, nome fine de la lernjaro. Aliaj federacioj organizas ekzamensesiojn, regulajn aŭ ne, tri-, du- aŭ unugradajn. Aliaj lasas tiun organizon al la kluboj aŭ aliaj organizaĵoj.
2. La ekzamenoj ebligas, unue, doni al la lernantoj limŝtonon sur ilia lernada vojo kaj, due, la kreskon de la nombro da diplomitoj (precipe kapableculoj) kaj tiel kontribuon al la landa kampanjo por enkonduko de Esperanto en la klerigan sistemon (provizante kapablajn korektantojn kaj instruantojn). Krome ŝajnas, ke, dum UFE ne povas mem zorgi pri ĉiuj ekzamenoj tra Francio, dum estas ne facile por lokaj kluboj regule organizi ekzamensesiojn kaj alvenigi ekzamenantojn, la federacioj povas pli taŭge regionskale organizi la ekzamensesiojn pro sia pliproksimeco (kp. kun UFE) kaj sia kapablo arigi rimedojn (kp. kun la kluboj).

La Interfederacia Konferenco interkonsentas, ke :

1. La federacioj zorgu pri la laŭebla organizo (far si aŭ aliaj) de regulaj ekzamensesioj en siaj respektivaj federaciaj teritorioj.
2. Estu disponebla tutlanda listo de la kapableculoj, farita kaj regule ĝisdatigita ekz. de ekzamena aŭ instrua organizaĵo (FEI, GEE…).
3. Okaze de ekzamensesio oni zorgu pri la komunikado al la gazetaro kaj pri la anonco de tiu sesio en la retejo de la Franca Esperanto-Instituto.

## 5. Interŝanĝoj de la federaciaj revuoj inter la federacioj

Notoj : Pluraj federacioj regule eldonas revuojn aŭ modestajn informilojn, per kiuj ili informas pri la vivo de la regiona movado. Tion faras la federacioj Bretona, Centrokcidenta, Francilia, Langvedoka-Rousijona, Nordfrancia, Normandia, Orientfrancia, Provenca, Sudopirinea. Tiaj informiloj ebligus pli bone koni la diversajn federaciojn kaj ties regionajn movadojn.

La Interfederacia Konferenco interkonsentas, ke :

De nun la federacioj laŭeble sendu po unu ekzempleron de siaj eventualaj revuoj aŭ informiloj al la ceteraj federacioj, nome al homo (prezidanto, ĉefredaktoro aŭ alia) indikita de la koncerna federacio.

Kromaj informoj :
Okaze de la dua komitatkunsido en la landa kongreso, XD informis, ke la interfederacia konferenco okazos almenaŭ unu fojon ĉiujare, nome en la landaj kongresoj de UFE. Krome estas dezirinde, ke okazu interfederaciaj laborkunvenoj pri specifaj temoj ekz. sabate antaŭ la dimanĉaj komitatkunsidoj de UFE en Parizo.

*Protokolo farita la 24an de Majo 2006.*

XAVIER DEWIDEHEM
*Prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-Federacio*